

Ernest Naville, 7-a parto  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 493, 1973.03.21 & 24

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj radioprelegoj ni interesiĝas pri la vivo kaj penso de la ĝeneva filozofo Ernest Naville, kiu estis la unua honora prezidanto de Svisa Esperanto-Societo.

A.- Ernest Naville, kiu naskiĝis en 1816 kaj mortis 93-jaraĝa en 1909, malkovris la proporcian balot-sistemon, kiu favoras la reprezentadon de la minoritatoj en la parlamentejoj.

Cl.- Estis la 12-a de novembro 1864, kiam Ernest Naville malkovris la principon mem de la proporcia balot-sistemo. Tuj li verkis memuaron kaj informadis politikajn gvidantojn. Jam la 9-an de januaro 1865 li organizis ĉe si kunsidon, kiu grupigis reprezentantojn de la partioj, kiuj tiam karakterizis la politikan vivon en Ĝenevo, la radikala kaj la sendependa partioj. Unu semajnon poste estis fondita ĝeneva societo por la proporcia balotsistemo sub la nomo : *Association reformiste [Reformisma Asocio]*.

A.- Dum 12 jaroj Ernest Naville prezidis tiun asocion, kies kunsidoj ne venigis multajn personojn. La ĉefa laboro de tiu asocio estis la rebato de la argumentado de la kontraŭuloj kaj la serĉado de matematika metodo, kiu faciligu la voĉdon-nombradon.

Cl.- En 1868 Ernest Naville inaŭguris siajn preleg-vojaĝojn tra Svislando per parolado prononcita en la studenta societo Zofingen en la urbeto Zofingen mem.

A.- En 1871 Ernest Naville publikigis en unu sola libro 19 publikaĵojn sub la titolo *Travaux de l'Association reformiste de Genève [Verkoj de la Reformisma Asocio de Ĝenevo]*.

Cl.- La 13-an de septembro 1876 Ernest Naville estis invitita de la Prezidanto de la Svisa Konfederacio, sinjoro Welti, kaj la postan tagon en Berno li prezidis la fondon de Svisa Societo por la Proporcio Representado, kies prezidantoj vice estos Ferdinand Falleti de Ĝenevo, Jean Berthoud de Neuchâtel kaj Paul Speizer de Bazelo. La kantonaj societoj por la proporcia reprezentado fariĝas sekcioj de la svisa organizaĵo. La postan jaron Ernest Naville forlasis la prezidon de la ĝeneva asocio.

A.- De 1885 ĝis 1895 Ernest Naville liveris artikolojn por la eldono de faka bulteno, kiun publikigis la Svisa Societo por la Proporcio Representado. Aperis 11 numeroj, kiuj larĝe kontribuis al la diskonigo de la novaj ideoj.

Cl.- La 31-an de marto 1889 okazis en Ĝenevo tre interesa eksperimento, kiun iniciatis Ernest Naville. Temis pri organizado de prova balotado bazita sur la principo de la proporcia reprezentado. Prezidis la eksperimenton bazela profesoro. Estis proponitaj 4 listoj kaj 873 balotantoj partoprenis la eksperimenton. La voĉdon-nombrado montriĝis multe pli facila, ol antaŭvidis la kontraŭuloj.

A.- Tiu eksperimento ripetigis du jarojn poste. Tiam ĝi estis organizita de la Granda Konsilantaro de Ĝenevo, tio estas la Parlamento, sub la prezido de la deputito Alphonse Frey. 7 listoj estis prezentitaj. 1207 bultenoj estis rikoltitaj en la urno. Teknike estis plena sukceso, malgraŭ la provoj de la kontraŭuloj alporti kiel eble plej multe da komplikajoj. De tiam la politika klimato estis matura, por ke la proporcia reprezentado rapide disvastiĝu en Svislando.

Cl.- Sed Ĝenevo estis nur la tria kantono, kiu akceptis leĝon favoran al la proporcia reprezentado. En Tiĉino okazis revolucio en septembro 1890, kies kaŭzo ĝuste estis la majoritata balotsistemo, kiu neniam permesis al la minoritataj tendencoj esti reprezentataj en la registaro. La federacia armeo devis okupi tiun kantonon, kaj solvo estis serĉata ĝuste helpe de nova balota leĝo bazita sur la principo de la proporcia reprezentado. La tiĉina popolo akceptis tiun leĝon la 18-an de marto 1891. Tuj la kantono Neuchâtel sekvis tiun ekzemplon pere de decido de la Granda Konsilantaro. Fine la 7-an de aŭgusto 1892 la ĝeneva popolo siavice ratifis novan leĝon, kiu estis por Ernest Naville granda venko. Tiun venkon markis Charles Secrétan, intima amiko de Ernest Naville, sendante al la ĝeneva filozofa gigantan kukon kun la surskribo : *Victoria*.

A.- Por Ernest Naville la batalo ne estis finita. Unue li volis, ke tiu nova politika sinteno influu la tutan svisan vivon, kaj due li volis diskonigi la principojn de la proporcia reprezentado en la tutan mondon. Li korespondadis kun plej diversaj personecoj tiucele, kaj restas de tiu laboro kolektoj de dokumentoj kaj de leteroj, kiuj troviĝas en la Universitata Biblioteko de Ĝenevo.

Cl.- En la kadro de tiu internacia kampanjo por la proporcia reprezentado Ernest Naville konatiĝis kun multaj utopiistoj. Inter ili troviĝis adeptoj de universala lingvo. Kaj ni scias, ke Ernest Naville iom post iom fariĝis varma defendanto de tiu nova ideo. Sed ni ne ankoraŭ retrovis sufiĉe da dokumentoj rilate tiun aspekton de la agado de Ernest Naville por jam povi paroli pri ĝi.

A.- Tiu prelego pri la politika agado de Ernest Naville eble donis al vi la impreson, ke tiu ĝenevano estis revoluciulo. Kontraŭe Ernest Naville estis multrilate konservativulo, kaj tio faciligis al li la kontakton kun la aliaj konservativuloj, dum liaj novaj ideoj akirigis al li la apogon de la maldekstruloj.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andree Gacond. Ĝis reaŭdo !